

Mallonga memprezento

Christer Kiselman

Komenco. Mi naskiĝis 1939-04-08 en Stokholmo, Svedio. Mi estis elektita kiel membro de AdE en 1989; poste reelektita en 1998 kaj 2007. Dum la periodo 1998-07-02—2005-01-03 mi estis la unua vicprezidanto. Mi nun kandidatas por la prezidanteco de AdE.

Dekkvarpaĝa prezento estas havigebla ĉe mia retejo. La nuna dokumento estas forte mallongigita.

Lingvokonoj. Miaj ĉiutagaj lingvoj, parole kaj skribe, estas la sveda, esperanto, la angla kaj la franca.

En la lernejo mi studis la anglan, la germanan kaj la francan. Private mi studis la rusan jam kiel 13-jarulo kaj poste studis ĝin en la Stokholma altlernejo.

Tre grava por mia kultura edukado estas la fakto ke mi vivis po unu jaron en Usono (Princeton, NJ) kaj Francio (Nico, Alpes-Maritimes) kiel esploristo respektive gastprofesoro, kaj poste ofte revenis al Francio, tiel ke mi pasigis entute pli ol du jarojn en tiu lando.

Mi komencis studi esperanton en lernolibroj pro inspiro en 1980 de Jarlo Martelmonto (Jarl Hammarberg), mia tiama bofrato, kaj plej multe lernis dum interparolado en la upsala Esperanto-Societo, kiu en la okdekaj jaroj havis plurajn tre viglajn parolantojn de la lingvo, inter ili Guy Coste, Tomas Jansson, Sven Jonsson, Ingrid Maier (nun membro de la redakta komitato de EES) kaj Leif Nordenstorm (aŭtoro de historia artikolo en EES 6).

Mi instruis esperanton je gimnazia nivelo dum la aŭtuno de 1999 kaj la printempo de 2000 en Katedralskolan, Upsalo.

Dum la periodo 1989–2009 mi estis sinsekve kunulo de du virinoj. Dum tiuj preskaŭ dudek jaroj ni parolis inter ni nur esperanton. Pro tio mi konas la lingvon en ĉiutagaj kaj intimaj situacioj.

Komisioj pri gvidado. Mi estis direktoro (prefekto) de la Matematika instituto ĉe la Upsala universitato dum 5 jaroj, dezano dum 4 jaroj, prezidanto de pluraj komitatoj, ekzemple de la Svedia nacia komitato por matematiko dum 8 jaroj, de la estraro de la Instituto Mittag-Leffler (nordia matematika esplorinstituto) dum 6 jaroj, de fakultata komitato por egaleco inter virinoj kaj viroj dum 2 jaroj kaj de fakultata komitato por informado dum pli ol 5 jaroj.

Esperanto-kongresoj. Mi partoprenis en dudek kvar Universalaj Kongresoj de Esperanto: en 1980 (tamen nur dum unu tago), kaj plene en tiuj de 1987, 1989, 1991, 1992 kaj 1994–2012.

Dum la kongresoj en 2009 kaj 2010 mi organizis la jaran Esperantologian konferencon, en 2012 kune kun Mélanie Maradan.

Dum tri jaroj mi estis la sekretario de la Internacia kongresa universitato (IKU): Vilno 2005, Florenco 2006, Jokohamo 2007. Dufoje mi servis kiel la rektoro de IKU.

Mi kvarfoje partoprenis en la simpozioj en Karlovo organizitaj de Boĵidar Leonov kaj nomataj *Apliko de Esperanto en Profesia Agado*, AEPA, nome en 2009, 2010, 2012 kaj 2013.

Ĉu laborplano? Mi resumas kelkajn ideojn menciitajn en la memprezento tiel:

1. *Priskribo de la lingvo esperanto.* Mi volas provi prezenti pli taŭgan priskribon de esperanto, se eble kun helpo de elstaraj lingvistoj sendepende de tio, ĉu ili membras en AdE aŭ ne.
2. *Terminologio.* Ĉar la terminologiaj taskoj en sia tuteco superas niajn fortojn, mi pensas ke la akademio devus zorge pripensi kion fari por esperanto. Eblas certe fari ion, sed ni devas antaŭe decidi kio plej gravas. Kunlaboro kun UEA povus esti bona vojo: la akademio povas profiti de specialistoj lige al UEA.
3. *Konferencoj.* Demando estas ĉu la akademio volos organizi renkontiĝojn en la estonteco similajn al tiuj de Prago 1994, Zagrebo 2001 kaj Gotenburgo 2003.
4. *Jura sidejo.* Mi volus demandi pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj havi juran sidejon. Se la avantaĝoj estas pli grandaj ol la malavantaĝoj, venonta paŝo estos esplori kiel ni povos realigi tion. Se male, la malavantaĝoj superas la avantaĝojn, ni faru nenion.

Paperpoŝta adreso: Upsala universitato, Matematika instituto, Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio

Sukcenaj adresoj: kiselman@math.uu.se, christer@kiselman.eu

Retejo: www2.math.uu.se/~kiselman/